

# Flandra ESPERANTISTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN - PROPAGANDA

Verschiĝnt maandelĝks  
Dertiende jaargang  
JUNI 1946  
NUMMER 6 (144)

Vertegenwoordiger in Nederland :  
NEDERLANDA ESPERANTO-CENTRO  
Diergaardesingel 96, Rotterdam-C  
Girorekening : 272818 van N. E. C.

FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO v.z.w.  
Redactie en Administratie :  
Pieter van Humbeekstraat 3, Brussel-West  
Postrekening : 326851 van F. E. I.

5 fr. : 's jaars 60 fr. 5 fr. : jarabono 60 fr.  
Steunabonement 100 fr. Subtena abono 100 fr.  
Voor Nederland 4 fl. Por Nederlando 4 fl.  
Overige landen 75 fr. Ceteraj landoj 75 fr.

## Grava Sukceso :

ESPERANTO EN BELGA RADIO !

Plej grandan sukceson akiris kaj aplaudon vekis dum nia ĵus okazinta Kongreso la komuniko kiun faris dum la ĝenerala jarkunveno de Flandra Ligo Esperantista nia Prezidanto, D-ro T. van Gindertaelen, pri la decido de la Nacia Radio-Instituto : disaŭdigi ĉiusemajne favore al Esperanto ekde oktobro venonta.

Jen senkonteste grava akiro kiu en Flandrujo konsiderinde antaŭenpuŝos nian aferon !

Dum ĉiu sabata posttagmezo de monato oktobro propaganda parolado en nederlanda lingvo preparos la terenon por la elementa radio-kurso kiu komenciĝos la unuan sabaton de novembro.

Ne nur per si mem tiu radio-kurso estos unuarange grava, sed ankaŭ ties psikologia efiko estos ne neglektinda. Per ĝi konsiderinde plialtiĝos la prestiĝo de Esperanto kaj de ĝiaj uzantoj kaj propagandistoj en la menso de larĝaj amasoj. Ja, samkiel la lingvoj Angla kaj Franca la Esperanta estos instruata per radio! Ignori la internacian lingvon iĝos malebla, ĉar per tiu kurso Esperanto ricevos kvazaŭ duonoficialan sankcion!

Evidente profitos el tio ankaŭ niaj lokaj kursoj por kiuj ni rajtas antaŭvidi grandan intereson. Ĉu estas necesa substreki ke ni devas multoblige ilian nombron por venonta vintro, kaj jam nun devas nin pretigi por tiu fortostreĉo?

Ne estas hazardo, ke la oficialaj instancoj tie ĉi samkiel en multaj aliaj landoj komencas serioze konsideri Esperanton. La lingvaj mallacilaĵoj spertitaj dum milito okazate de senprecedencaj homokirtoj vekis akutan atenton por la problemoj de la lingvodiverseco, ankaŭ ĉe la anoj de la grandaj, t. n. internaciaj lingvoj.

Kaj tio ne estas iluzio de nia tro granda optimismo. Ne! Ne-esperantistaj institucioj per enketoj kaj sondado de la publika opinio en diversaj landoj havigas al ni indikojn tute fidindajn kaj tre multsignifajn.

Ni jam scias pri la rezulto de la enketoj de la Gallup-Instituto en Usono kaj de S. S. S. (aŭ « Service de Sondage et de Statistique ») en Francujo; enketoj el kiuj evidentiĝas ke la granda plimulto de la homoj simpatias al nia afero. La subita disvastiĝo de Esperanto en la Balkanaj landoj, nia kresko en Anglujo, la sukcesoj en Brazilo, la ekburĝono en Sud-Afriko estas nek iluziaj, nek hazardaj!

Kaj en tiu ĝenerala koncerto Flandrujo ne estas escepto!

Kvankam aliloke en tiu ĉi sama numero ni, en nacia lingvo, jam aludas pri tio, ni deziras tie ĉi ripeti la rezulton de la enketo de la « Libera Radio-Tribuno » de la Belga Nacia Radio-Disaŭdigo pri la demando : « Kion vi opinias pri la neceso de lingvo internacia? »

Favore al internacia lingvo sin deklaris 87,50 % de la partoprenintoj, kontraŭ 12,50 %. Tiujn 87,50 % da favoraj opinioj ni povas subdividi en 51,25 % por Esperanto, 27,50 % sen prefero al iu lingvo, 6,87 % por la Angla, 1,25 % por la Latina kaj 0,62 % por la Franca lingvo.

Jes, vere : la atmosfero estas favora, kaj « Nun aŭ neniam ni prenu nian ŝancon! »

E. C.

## Heraldo de Esperanto

La granda internacia kaj sendependa organo de la tutmonda Esperantomovado estas abonebla ĉe

FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO  
Nova prezo : 90 bir.

## De Babeltoren

Adama van Scheltema verhaalt ons in de inleiding tot zijn vertaling van Faust wat sommige zijner voorgangers, die zich eveneens waagden aan het vertalen van Goethe's meesterwerk, van hun taak terecht brachten. Ziehier hoe hij over de zeer bijzonder linguïstische kennis van deze vertalers schrijft :

« De eerste Nederlandsche Faust-vertaling (pl. m. 1842) is die van een ver-

In het kader der huidige wereldgebeurtenissen krijgt die machteloosheid een tragisch karakter. Nu er door aardse goden permanent gepalaberd wordt over het verdere lot onzer halfdoodde planeet in de meest diverse vergaderingen, krijgen wij zoo'n beetje den indruk, dat zij bouwen aan den Vrede, op een wijze zooals wel eer werd gebouwd aan den Babeltoren. Neen, de nakomelingen van Noë bezaten

## La XI-a Kongreso de Flandra Ligo Esperantista



Kompleta sukceso! — Legu la detalan raporton sur la tria paĝo.

duitschten Vlaming, L. Vleeschhouwer, waarvan, voor zoover ons bekend, alleen de tweede, omgewerkte uitgave (1865) nog in weinig exemplaren bestaat. Enkele woorden uit de inleiding daarvan werpen een eigenaardig licht op vertalers en critici van dien tijd. De schrijver kapittelt daar enkele anderen, als een zekeren Franschman, Henri Blaze, wiens — laat ons zeggen : zin voor élégance b.v. — den regel :

« Wie sie kurz angebunden war », had doen vertalen als :

« Quel corsage bien pris! »

Niet minder rechtmatig verontwaardigd keert Vleeschhouwer zich dan tot zekeren Dr. Snellaert, lid van hooge letterkundige colleges die hem gestreng verweten had de woorden :

« Jeder sonnt sich heute so gern », te vertalen als :

« Op dezen dag zont ieder zich zoo graag ».

Het moest volgens den geleerden Doctor zijn :

« Op dezen dag bezondigt ieder zich zoo graag ».

Men deelt Vleeschhouwer's boosheid ! Maar wanneer wij hem dan zelf aan den gang zien en b.v. uit den aandoenlijken monoloog van Greetje aan het spinnewiel de woorden :

« Mein armer Kopf, Ist mir verrückt », zien vertalen als :

« Mijn arme kop Is mij ontruk », dan staan wij toch even beduusd, en is het moeilijk te raden, wie van deze drie geletterde heeren wel de meest onbevoegde zal geweest zijn!

Wij staan even beduusd als Adama van Scheltema, maar we weten precies dat deze drie geletterde heeren op stuk van onbevoegdheid universele symptomen vertoonen. Niemand kan ooit een vreemde taal benaderen « zonder heur geweld aan te doen ». Elke taal is als de muziek van een bepaald instrument. Ze kan schitterend nagebootst worden door een ander instrument. Maar nabootsing zal ze blijven.

niet de technische middelen, cabines, kop-telefoenen, tolken, enz. zooals onze huidige atoomknievers, maar het resultaat voor beide bouwlui zal hetzelfde zijn. Weer zal een toren, dien men waande op te bouwen tot in den hemel, onafgewerkt blijven door de verwarring der talen.

Nu alle technische middelen ter beschikking staan van oratorium en auditorium voelen wij ons geneigd ironisch te verklaren, dat de moderne goden van den Olympus ooren hebben en niet hooren « willen ». Doch de klacht van Adama van Scheltema is daar om ons alle illusie te ontnemen over de competentie der honderden en nog eens honderden tolken, die, in hun oncontroleerbare wijsheid, zich heel wat grover enormiteiten kunnen veroorloven dan de drie taalbeulen over wie de Nederlandsche letterkundige zich ergerde. En wat dan nog met de vocale kleur, die een indrukwekkende rol kan spelen bij gesproken vertalingen en zeker volstrekt oncontroleerbaar blijft? Immers, met een variante op zeker wijs gezegde, laat mij den bijbel voorlezen en ik kan hem zóó voorlezen, dat U gelooft naar een pornografisch werk te luisteren. Men vloekt van woede, maar men vloekt ook van vreugde, kwestie van stemnuances.

Als we dan nagaan, dat elk woord én elk accent een ontzaglijk belang krijgt bij het gigantisch proces, waarbij letterlijk alles voor het mensdom op het spel staat, kunnen we 't niet verhelpen dat we heel even huiveren.

De laatste tijden hebben ons gelegenheid te over gegeven te beluisteren wat de beruchte staatsmannen zelf van vreemde talen terechbrengen. Het klonk eenvoudig potsierlijk na al hetgeen persmensen ons eertijds over de enorme linguïstische capaciteiten dier zelfde staatslieden hadden wijsgemaakt. Op dit punt werden den verbaasden man van de straat alle illusies ontnomen.

Rechtstreeks verbaal contact — zonder tolk — tusschen de staatsmannen is dus momenteel niet denkbaar en nochtans zou de wereld er alles bij te winnen hebben indien de fabrikanten van vrede en oorlog elkander « begrepen », wat nog iets meer beteekent dan « verstaan ».

door

Frans Carilan RIDWIT

't Is verbijsterend te constateeren welke fortuinen worden vergooid aan toch immer onvolmaakt blijvende technische hulpmiddelen om aan de Babelverwarring iets te verhelpen, terwijl toch jaren geleden een zekere Poolsche arts Samen Hof bijna een heel leven wijdde aan 't scheppen eener taal die in een minimum van tijd en met een minimum van inspanning door wie ook ter wereld kan aangeleerd worden. Deze taal — het Esperanto — leent zich volkomen tot het vertolken van de diepste gevoelens en ingewikkeldste zaken, het is een eenig instrument om van mensch tot mensch, van hart tot hart te praten. Een belachelijk kleine inspanning vanwege alle staatsmannen ware voldoende om meteen alle kostelijke praatmotoren en taalmolens definitief uit te schakelen.

Maar wellicht is het Esperanto een even doodsvaarlijk element als de ontwapening. Het resultaat van hun toepassing zou te grondig, te radicaal en bovenal te weinig lucratief zijn. Indien er aan dien verdraaiden Babeltoren moest gebouwd worden met « begrip » en « liefde » dan zou wel eens het wonder kunnen geschieden, dat het bouwwerk opschiet. En wat voor nut kan het hebben voor den mensch den hemel te bereiken langs den toren zijner verlangens? Eén kleine atoombom verzekert hun de gelukzaligheid heel wat sneller en zekerder.

En toch, juist de hardnekkige miskenning door de aardse mastodonten van dié elementen, welke radikaler nog dan een atoombom den achtbaren generaal Mars en zijn staf kunnen verpulveren, moet een stimulans zijn voor alle idealisten om even hardnekkig die elementen aan de wereld op te dringen. De Esperantisten bezitten aan hun taal één dier elementen. Zij moeten ze de gemartelde menscheid leeren hanteeren als een preventieve defensie — wie sprak er ook eens van een preventieven oorlog? — tegen de strategische toekomstplannen der « Marskramers » om onzen gelukstoren voor den eeuwig... laatsten keer te rammeien!

## Letera el Bulgarujo

S.ANO KRESTANOV SALUTAS !

De Prof. Ivan H. Krestanov, bone konata al multaj flandraj esperantistoj kiuj sendube ankoraŭ memoras la interesajn paroladojn tie ĉi faritajn antaŭ la milito de tiu senlaca veterano, ni ricevis kortuŝan skribajon :

Kun plezuro mi legis ke « Flandra Esperantisto » denove aperas regule. Mi tre deziras ĝin ricevi! Dank'al Dio min indulgis la terura bombardado de Sofia, sed, vel, forbrulis mia tuta loĝejo kaj cindriĝis mia karega, ampleksa librokolekto : pli ol 3.000 binditaj volumoj kaj 713 gazetarkolektoj! Ĝi estis mia trezoro kaj mia fiero. Perdo neriparebla!

Mi gvidas esperanto-kursojn kaj reverkas mian cignan kanton : « Tra Eŭropo per Esperanto » kies manuskripto ankaŭ detruigis.

Mi tre deziras ricevi la numeron de Flandra Esperantisto en kiu aperis artikolo de mi kune kun mia foto (1).

Atendante vian respondon, kaj eblan sendajon, mi salutas ĉiujn flandrajn geamikojn inter kiuj mi pasigis neforgeseblajn horojn en 1938! »

(1) Ni ne plu disponas pri numero 123 de F. E. (Septembro 1939) kiun aludas S.ano Krestanov. Kiu flandra samideano povas malhavi tiun numeron? Anticipan dankon nome de nia bulgara amiko!

# OBSERVOJ

« MENADE BAL — PŪKI BAL » ?  
 Ĉi tiu devizo (« Unu homaro — unu lingvo ») de la Volapükistoj trovas adeptojn ĉe parto de la nuna esperantistaro.

Tia sinteno kompreneble devias de la Esperantismo, kiu « estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu, ne enrudante sin en la internan vivon de la popoloj, kaj neniam celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn, donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon komprenigadi intersi. »

Ni, Esperantistoj, povus ne atenti tiun celadon, konsiderante ke « ...ĉiu alia ideo aŭ espero kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la Esperantismo, estas lia afero tute privata, por kiu la Esperantismo ne respondecas », se... ĝi ne havigus al la kontraŭuloj de Esperanto ĉelargumenton. Tial ni kredas nepre oportuna, ke ĉiuj esperantistoj sin limigu je la devizo : « Esperanto, la dua lingvo por ĉiu! », eĉ se kelkaj inter ili vidas en ties efektiva nur ŝtupo al « pli alta celo ». PIK.

## ESPERANTO IN DE B. N. R. O.

Op Zondag 2 Juni 11. werd Dr. T. van Gindertaelen, Voorzitter van den Vlaamschen Esperantisten-Bond, voor de radio geïnterviewd over ons XI<sup>e</sup> Congres te Brugge. Drs. F. Roose, Voorzitter van het inrichtend comité, sprak op Woensdag 5 Juni j.l. voor den gewestelijken zender Kortrijk insgelijks over ons congres.

Vanaf 5 October a.s. zal in den Nationalen Zender van de B.N.R.O. iederen Zaterdagmiddag 10 minuten aan Esperanto worden gewijd. Voor de maand October is een reeks voordrachten over Esperanto voorzien als inleiding tot den radio-cursus die op Zaterdag 2 November aanvangt. Te rechter tijd publiceert « Flandra Esperantisto » bijkomende inlichtingen dienaangaande.

## DE PUBLIEKE OPINIE OVER ESPERANTO.

Nu weten we dat de oorlog de Amerikanen « language conscious » heeft gemaakt zoodaals gebleken is uit de poll's van het Gallup-Instituut. Hierin spraken zich 71 t.h. ten voordeele van een tweede taal, dezelfde voor ieder, uit, 17 t.h. stonden afwijzend hiertegenover en 12 t.h. bleek desbetreffend geen bepaalde meening te bezitten.

Maar het voorgaande is niet het merkwaardigste van de onderzoeken dienaangaande in de U.S.A. ingesteld. Wat van groot belang is, is het feit dat 76 t.h. van het percentage dat zich ten voordeele van een wereldhulptaal in het algemeen uitsprak, zich ook bereid verklaarde deze aan te leeren... ook als ze niet het Engelsch mocht zijn!

Werkelijk, er is wat veranderd langs gene zijde van den grooten plas, waar men is gaan beseffen dat het Engelsch niet DE internationale taal is waarvoor ze soms wordt versleten.

## DE OPINIE IN FRANKRIJK.

Door de instelling « Service de Sondages et de Statistique » werd dienaangaande de opinie bij onze zuiderburen gepeild. De gestelde vraag luidde : « Acht U het gewenscht dat in alle landen der wereld een internationale taal als het Esperanto verplichtend op het leerplan komt? »

Antwoorden hierop « ja » : 65 t.h.; « neen » : 20 t.h.; hadden geen bepaalde meening dienaangaande : 15 t.h.

Het argument dat Esperanto alleen kans heeft bij de leden van kleine taalgebieden wordt hier andermaal weerlegd!

## EN BIJ ONS !

Bij gebrek aan poll's verwijzen wij naar den uitslag der enquête door de « Vrije Radio-Tribune » van den B.N.R.O. ingesteld met de vraag : « Wat denkt U over de noodzakelijkheid van een Wereldtaal? »

Ten gunste van de wereldtaal spraken zich 87,50 t.h. der inzenders uit, 12,50 t.h. stonden er afwijzend tegenover. De 87,50 t.h. ten gunste kunnen worden onderverdeeld in 51,25 t.h. voor Esperanto, 27,50 t.h. zonder bepaalde voorkeur, 6,87 t.h. voor het Engelsch, 1,25 t.h. voor het Latijn en 0,62 t.h. voor het Fransch.

Zoodaals blijkt is de publieke opinie overal en niet het minst in Vlaanderen ons streven in hooge mate genegen. Smeden, Esperantisten, het ijzer gloeit!

## BABEL ORGANISEERT ZICH

In de pers lezen we het volgende aangaande de bijeenkomst der Ministers voor Buitenlandsche Zaken die einde April j.l. te Parijs gehouden werd : « De Ministers die gezellig aan een ronde tafel zullen plaats nemen worden vergezeld door hun tolken, die naarmate zullen vertalen. Als officieele talen werden aangenomen het Engelsch, het Fransch en het Russisch. Alleen de beslissingen, niet de besprekingen zullen in de verslagen worden vermeld. Hierdoor zal het niet mogelijk zijn zich tijdens de besprekingen te beroepen op een woord, dat tijdens een vorige vergadering werd uitgesproken. Immers, tijdens de conferentie van September j.l. werden er sommige afgevaardigden van « beschuldigd » hun houding te hebben gewijzigd enkel en alleen omdat hun

# Plaatselijk Nieuws

BRUSSEL. — Op 18 Juni j.l. sprak de Deensche oorlogscorrespondent H. C. Nielsen alhier in de Middelbare School der Allardstraat over « Denemarken tijdens de Bezetting ». De voordrachtgever sprak in het Esperanto, voor een korte vertaling werd gezorgd.

Oorlogscorrespondent Nielsen is op doorreis in ons land en oogste veel succes in de verschillende steden van het Vlaamsche land waar hij hetzelfde onderwerp behandelde.

Op Zondag 23 Juni deden de Brusselsche Esperantisten een uitstap naar Braine-le-Château om er de Esperantistenvereniging « Juneco » een bezoek te brengen. De deelnemers vertrokken te 14.42 u. in het Zuidstation en reisden tot Halle alwaar een afvaardiging van « Juneco » de Esperantisten uit de hoofdstad opwachtte. Het werd een aangename namiddag die de deelnemers lang zal geheugen.

ANTWERPEN. — Op 5 Juni j.l. sprak S.ano M. Jaumotte over « La Ruĝa Kruco ». Op Woensdag 3 Juli a.s. te 20 u. zal S.ano Deckkers de laatste Esperantovoordracht houden van het seizoen in het Esperanto-huis der Lange Leemstraat 127.

Het bestuur van het coördineerend Esperanto-comité uit de Scheldestad zal voor het aanstaande seizoen haar werking uitbreiden : een hoogere Esperanto-cursus ligt in het verschiet, een toneelgezelschap zal worden opgericht en een nieuwe reeks Esperantovoordrachten is in voorbereiding.

# VERDA KRONIKO

★ Antaŭ la milito multaj centoj da esperantistoj ĉiujare partoprenis la feriajn esperanto-kursojn en Danlando. Dum la milito kaj la germana okupado ili konstante okazis, sed nur kun danaj partoprenantoj. Nun denove estas ebleco ke alilandaj esperantistoj partoprenu tiujn interesajn kaj agrablajn aranĝojn kiuj okazos en Hadsten kaj Helsingor fine de julio kaj komence de aŭgusto venonta. La prezoj por loĝado kaj manĝaĵoj estas eksterordinare favoraj. Petu detalan prospekton al F. E. I.

★ Sub gvido de ŝtate ekzamenita esperanto-instruisto K. Solc (eksinstruisto de Flandra Ligo Esperantista) okazos someraj kursoj de esperanto en la agrabla libertempoj Doksy ĉe lago Macha (Ĉeĥoslovakio) fine de monato julio venonta. La restadkostoj estas malmultekostaj kaj la aranĝoj tre allogaj. Petu ilustritan prospekton de K. Solc, Mlada Boleslav 41/1, Ĉeĥoslovakio.

★ La unua postmilita internacia kongreso de esperanto okazos venontjare en Bern. (1947 estu la jaro de la rennuiĝo de la universala esperanto-movado!) En 1948 la internacia esperanto-kongreso okazos en Malmö, Svedujo.

★ La 22-an de aprilo pasinta mortis en Rio de Janeiro la prezidanto de Brazila Ligo Esperantista, D.ro A. Couto Fernandes, kun kiu la estraro de Fl. L. E. ĝis antaŭ nelonge havis konstantan kontakton. Dum 40 jaroj li laboregis por Esperanto kaj la elstaran pozicion de nia lingvo en la granda sudamerika respubliko ni grandparte dankas lian fervoron.

★ Ĉiu esperantisto-radioamatoro bone memoras la agrablajn kaj interesajn disaŭdigojn de Radio Roma. Se vi redeziras la elsendadon de la « Italaj Turismaj Kronikoj » skribu esperantlingve al ENIT (Ente Nazionale Industrie Turistiche), Radioturismo, ROMA!

★ Dum la Paskotagoj la « Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo » kongresis en Alkmaar. Pli ol kvincent esperantistoj partoprenis la grandsukcesan kongreson kies honora prezidanto estis Ministro Drees, mem fervora esperantisto.

★ La 24-an de marto okazis en la Universitato de München Esperanto-propagandkunveno kiun ĉeestis 400 personoj.

★ La 13-an de aprilo pasinta mortis en Meksiko la eminenta kaj tre meritplena hispana esperantisto Generalo Julio Mangada Rosenörn.

wordvoerders op vorige vergaderingen zich hadden uitgedrukt in bewoordingen die ze later meenden te moeten wijzigen... »

Aan deze veelzeggende berichtgeving kunnen wij toevoegen, dat een recent onderzoek heeft bevestigd, dat struisvogels nimmer Esperanto leeren, maar liever, op het psychologische moment, hun kóp in het zand steken...

# LA STUDANTO

## KONATULO, NOBELULO, TRIMASTULO

Ik vermoed dat de « Studantoj » reeds hun vonnis hebben geveld : « verkeerd gebruik van « ul » ! Sommigen hoor ik er zelfs aan toevoegen : « verkeerd gebruik om verscheidene redenen! »

Deze meening stemt volledig overeen met de werkelijkheid en biedt, gezien deze onjuiste woorden dikwijls — verrassend dikwijls — voorkomen, de passende gelegenheid om nader het gebruik, den aard, de vergissingen van en nopens « -ul- » te verduidelijken en samen te vatten.

Ul is een achtervoegsel, zoodaals men er een reeks kent in Esperanto en die de soepelheid van onze internationale taal uitleggen. Het duidt een **individu**, een **persoon** aan (dus een **levende** zelfstandigheid aan en ook **dieren**), die de **eigenschap** bezitten uitgedrukt in het **stamwoord**. Men brenge het in verband met **aj**, ander achtervoegsel, soort tegenhanger van **ul**, dat **levenlooze** zelfstandigheden noemt.

Ul duidt derhalve het individu aan wiens doorslaande, hoofdhoedanigheid is deze van het **stamwoord**, men kan het haast gelijkstellen met een **individueele** manifestatie, een **belichaming** van de bedoelde hoedanigheid; **aj** daarentegen geeft slechts een **concrete** manifestatie weer.

Het suffix **ul** wordt gehecht aan **stamwoorden** van uiteenlopenden aard :

**Hoedanigheidswoorden** of **bijvoeglijke naamwoorden** : individueele manifestatie van de hoedanigheid, zoo juna, junulo; avara, avarulo. Best kan men de draagwijdte van het nieuwe woord doen aanvoelen, wanneer men zeggen zou : junulo, hij is de jeugd zelve!

**Werkwoorden** : het individu is als de belichaming van de handeling door het werkwoord uitgedrukt, zoo domineert zij in hem; zoo, timulo, verpersoonlijking van timo, drinkulo, enz. Soms treft men **ulo** bij een deelwoord aan, zoodaals in **konatulo**, **instruitulo** : verkeerd, omdat het deelwoord op zich zelf reeds als zelfstandig naamwoord aangewend wordt, zoodat **-ul-** totaal overbodig is.

**Zelfstandige naamwoorden** : de naam van het woord in een levend wezen concreetiseerd en **ulo** staat in feite gelijk met **eculo**, zoo ĝibo-ĝibulo, scienco-scienculo e. d. Onder deze rubriek rangschikt men de gevallen waar **ulo** een dier aanduidt (b.v. vertebrulo, mamulo, kornulo, kvarpiedulo, duhufulo, dikhaŭtulo enz.). Daar **ulo** steeds een levend wezen aanduidt, is zijn gebruik — wanneer levenlooze wezens bedoeld worden — uit den booze : b.v. trimastulo (trimasta ŝipo), dat men zelfs in het groote Esperanto-woordenboek ontmoet van A. G. J. Van Straaten! Daarenboven, zoo het zelfstandig naamwoord op zich zelf een individu aanduidt, is **ulo** overbodig en te vermijden : zoo, nobelulo (nobelo), ĉefulo (ĉefo), najbarulo (najbaro) e. d.

**Voorzetsels** (b.v. apudulo, subulo), **oorspronkelijke bijwoorden** (morgaŭulo, tiamulo e. d.) : **ul** maakt er substantieven van; men treft tenslotte **ul** nog aan in samenstellingen met voor- en achtervoegsels (b.v. etulo, fiulo).

**Ulo**, **zelfstandig** gebruikt : daar het een achtervoegsel geldt dat een persoon aanduidt gekenmerkt door... en er in casu geen hoedanigheid wordt bijgevoegd, beteekent het niet enkel een onbepaalde persoon (individu, iemand, persoon), doch bestaat er wel een neiging aan **-ulo** een beleedigend karakter te geven.

**-Ulo**, **-anto** en **-isto** : er is een duidelijk verschil en gewisse nuance merkbaar in de woorden samengesteld met behulp van deze achtervoegsels en men illustreert het gemakkelijk, zoo : **trompanto** : iemand die toevallig en nu bedriegt. — **trompulo** : iemand wiens hoofdtrek het bedriegen is, de belichaming van het bedrog wordt. — **trompisto** : iemand die een beroepsmensch is op stuk van bedrog.

I. V. G.

**Bronnen** : Plena Gramatiko (Kalocsay-Waringhien); Tra la Labirinto (F. Faulhaber); Kompleta Gramatiko (P. Fruicnter-Grenkamp); Internacia Gramatiko de E. (L. Kitzler); Plena Vortaro (Grosjean-Maupin k. a.).

## OEFENING 14

Hieronder, ter vertaling in 't Esperanto (A) en in 't Nederlandsch (B), kleine opgaven. In ons volgend nummer publiceeren wij een modelvertaling, met aanduiding van eventueele varianten en aantekeningen, naargelang zij uit de inzendingen wenschelijk blijken.

De oefeningen worden talrijk ingewacht langs de redactie om!

Let wel! Wie persoonlijk zijn werk verbeterd terugverlangt, verzuime niet een zegel voor antwoord in te sluiten!

Komaan, de gelegenheid gretig te baat genomen! Aan 't werk!

### A. Zinnetjes :

1. Beroemde mannen hebben soms vreemde gewoonten.
2. Een gewezen zeeman spreekt graag over zijn reizen.
3. De gestrafte leerling stond in den hoek : hij had zijn les niet geleerd.
4. De banken van deze school zijn te laag en te eng voor de cursisten.
5. Wanneer bezoekt gij me eens in mijn nieuwe woning?
6. Waar gaat hij heen? Waarschijnlijk naar huis.

### B. Rakontetoj :

#### 1. Ampromeso :

« Mi juras ke vi estas la unua ino kiun mi amas! »

« Mi bone scias tion, karulo. »

« Mirinde! Vi estas samtempe la unua kiu kredas tion. »

#### 2. Diferenco :

« Kio estas la diferenco inter moderna kaj malmoderna knabino? »

« Malmoderna knabino ruĝiĝas kiam ŝi hontas... kaj moderna knabino hontas kiam ŝi ruĝiĝas... »

#### 3. Azenoj :

En la zoologia ĝardeno, antaŭ la azenoj : **Knabo** : Paĉjo, ĉu ankaŭ azenoj geedziĝas? »

**Patro** : « Nur azenoj, mia filo! »

(Ĉiuj el : « Gaja Leganto per Esperanto » de P. E. Schwern.)

## VERTALING VAN OEFENING 13

### A. La malnova konstruaĵo :

En tiu malnova konstruaĵo la maljuna ĝardenisto Lope loĝis kun sia filino. En antaŭa tempo, ĝi estis loĝata de nobela hispana familio; sed tio jam de longe pasis, oni rakontis : la gento formortis. Post la morto de la barono kaj de la baronineto la domo estis vendita, kaj de tiam ĝi apartenis al la familio de la ĝardenisto. Ankaŭ la meblaro estis dissemita tien kaj tien ĉi, jes eĉ la portretoj de la barono kaj de la baronineto trafis la saman sorton kaj oni ne sciis kien ili nun perdiĝis. En la ĉirkaŭaĵo oni diris ke ili ankoraŭ tie fantomas kaj vagas kaj serĉas sian vojon. Jam en sia infaneco eta Olive aŭdis rakonti tion; ĉar ŝia patro ŝatis vaste detali tion : li eksciis tion de sia avo kaj en la muroj de la salonego li ankoraŭ montris la hokojn sur kiuj la portretoj iam pendis. (El « De Verdwaalden », novelo de V. Loveling.)

### B. Fox, de hond, en de vlieg.

Buitenshuis ŝajnt de zon, zingen de vogelen en geuren de bloemen. Binnenshuis is alles en iedereen stil. Het is een idylle. Doch de idylle duurt niet. In de kamer zijn er ook vliegen. De vliegen zoe-men in de kamer en 't is uit met de stilte en den vrede. Nu zit er een vlieg op een neus, dan op een andere neus. Thans zit er een vlieg op den neus van den hond en Fox is woedend, hij blaft uit alle macht. De gansche familie trilt om het harde geblaf. De heer Grann spreekt den hond toe, maar de hond gehoorzaamt niet. Van schrik begint Lisa te weenen, en de tranen vloeien uit de kleine oogen. De schoone idylle is voorbij. (Uit « Okazas Nenio », van Chr. Hougaard, oorspronkelijk romannetje, blz. 5.)

## El la Redakcia Leterujo

### LA PREZOJ EN HUNGARUJO

De S.ano Stefano P. Nagy, eldonanto de « Sudhungarlanda Stelo » (kun jara abonprezo por Hungaroj de ... 48 folioj da neuzita blanka papero de formato 29 X 42 cm.!) ni ricevis leteron el kiu ni ĉerpas:

La prezoj de nutraĵoj kaj varoj plialtiĝas preskaŭ ĉiuhore : unu kgr. da pano kostas 9 milionojn da pengoj, 1 kgr. da graso 25 milionojn kaj en Budapeŝto 1 mihardon! Saman prezon kostas unu kgr. da sukero kaj ni elspezas 2 milionojn da pengoj por aĉeti ĵurnalon dum ke unu folio da neuzita skribpapero kostas la duoblon. Kiel vi povas konstati mi afrankis jenan leteron per poŝtmarko de 8 milionoj. Hodiaŭ matene mi aĉetis ovon kaj ĝin pagis 10 milionojn. Kiam tiu ĉi letero estos en via posedo vi kredeble jam povos multoblige tiujn prezojn per 5 aŭ 10!

# La XI-a Kongreso de Flandra Ligo Esperantista en Brugge dum Pentekosto 1946

Elirante la stacidomon de la kongresurbo nia karavaneto, post longa vojaĝo en la sufoka atmosfero de troplenaj kupoj, sin direktis al bone videbla bonveniga streĉtuko, ĉe kiu staris anoj de la organiza komitato pretaj nin gvidi al la akceptejo.

Tie, ĉe tablo, sidis la stabo de la organiza komitato kiu enmanigis al ni la tradiciajn kongresdokumentojn kaj deĵoris taĉmento de 12 ĉarmaj fraŭlinoj en plaĉa Esperanto-uniformo: blanka bluzo kun verda stelo sur la sino kaj verda ĵupeto. (Tiuj verdaj ĵupetoj montriĝis genia elpenso: en kazo de embaraso ili efikas kiel saviloj al la eksterurbaj kongresanoj kiuj rapide kutimiĝis kroĉiĝi al ili!)

Esfortite per «verda ĵupeto» ni iris al nia hotelo por refreŝigi nin kaj por rapidi al la kunveno de la membroj de Flandra Esperanto-Instituto. Tie ni trovis la nelacigeblan direktoron de nia Instituto, S-anon Cortvriendt, jam meze en funda pritrakto de la nuna situacio de nia Instituto. Li skizis tre trafe kaj klare la aktivecon pasintan kaj nunan de F.E.I., kaj faris sagacajn sugestojn por la tujaj estonto. Liaj konvinkaj paroloj infektiis ĉiujn ĉeestantojn kiuj plene konsciis pri la gravaj taskoj ankoraŭ plenumotaj antaŭ la jarkonveno. Li finis, esprimante la esperon ke pli kaj pli da flandraj esperantistoj sin interesos ankaŭ finance al Flandra Esperanto-Instituto, kiu jam faris meritplenan laboron, sed kiu devas dekobligi sian aktivecon por triumfiĝi nian aferon en Flandrujo.

Tiu laborokunsido fortensis nin de la sonorilarkoncerto kiun la ceteraj kongresanoj dume ĝuis.

Reenirinte la akceptejon, post la naŭa vespere, ni konstatis ke la kongreso dancas. Ne rigidiĝis la kruroj de la flandraj esperantistoj malgraŭ multjara malaktiveco! Denove ni troviĝis en la karakteriza atmosfero de la kongresoj de Flandra Ligo Esperantista kies juneca ardo kaj samideana spirito montriĝis, dum normalaj cirkonstancoj, nerezisteblaj logiloj por eksterlandaj samideanoj. Dum duona horeto ni manpremis malnovajn konatojn kaj interkonatiĝis kun multaj novaj vizaĝoj de junaj, freŝbakitaj, «postmilitaj» samideanoj kies radiantia mieno kaj jam flua uzo de nia lingvo ne ĉesis mirigi nin.

Kantoj kaj kotiljonoj alternis kaj logis la plej obstinan nedancemulon de la seĝo. Estis neforgesebla vespero, vere interkonatiga! Je la «26-a» horo ni marŝkantante aliris nian hotelon, dum ke milda pluvo refreŝigis nian varman kapon kaj koron. Dimanĉmatene la kongresanoj vizitis la lokajn vidindaĵojn kiuj abundas en la kongresurbo. Dume la katolikaj samideanoj ĉeestis Diservon kaj aŭskultis altnivelan predikon de Pastro De Mayer en la historia kapelo de la Sankta Sango. Ni jam aŭdis multajn predikojn en Esperanto okaze de naciaj kaj internaciaj kongresoj, sed neniam ĝuis similan oratoran majstradon!

Sur la «Burgplaats» ĉiuj kongresanoj ariĝis antaŭ la urbdomo. En aparta salono la urba magistrato akceptis la estraron. Dume la kongresanoj eniris la mirinde belan gotikan salonegon en kiu okazis

## LA GENERALA JARKUNVENO DE FLANDRA LIGO ESPERANTISTA

D-ro F. Roose, prezidanto de la organiza kongreskomitato kaj de la loka sekcio de Fl. L. E., malfermis tiun solenan kunvidon per elokventa parolado en kiu li substrekis la signifon kaj montris la socialan rolon de Esperanto por la proksimiĝo de la popoloj. Disvolvante tiun altnivelan temon li montriĝis elokventa oratoro kaj akiris multan aplaŭdon de la ĉeestantoj.

D-ro T. van Gindertaelen, prezidanto de Fl. L. E., levigis de sia seĝo por oficiale saluti la eksterlandajn gastojn kaj la malnovajn kaj novajn flandrajn esperantistojn. Li honorigis la mortintajn samideanojn kaj instigis la novulojn sekvi ilian ekzemplan sindonon al nia movado. Li speciale dankis la organizan kongreskomitaton kiu ne hezitis en malfacilaj cirkonstancoj organizi tiun unuan postmilitan kongreson de la flandra esperantistaro. Li akcentis ke en tiu meritplena laboro ĝi plene sukcesis. Sed eliranta monate malgraŭ malfacilaĵoj konsiderindaj, kaj kies amplekso devas duobliĝi en baldaŭa estonto!

Li atentigis ke ni troviĝas ankoraŭ en la prepara stadio de nia multflanka disvolviga laboro. Vaste etendiĝas nia laborokampo antaŭ ni, paŝon post paŝo ni ĝin almitas kaj tion kion ni jam akiris kaj tenas, ni tenas firme!

Specialan dankvorton li direktis al S-ano Cortvriendt, la modela administranto de nia Instituto, al kies laborego, obstino kaj eltenemo ni plej grandparte dankas nian nunan jam enviindan pozicion.

Kun granda emocio li malfermis nian unuan postmilitan jarkunvenon (Sekvis longaj aplaŭdoj).

S-ano E. Cortvriendt levigis kaj vekis specialan atenton per emociiga pritrakto de la plej nigra kaj samtempe plej heroa paĝo el la historio de la flandra Esperanto-movado.

Li komencis: Pli malmultnombraj ol iam ajn ni ĉi jare kongresas, parte pro la cirkonstancoj nunaj, parte pro la suferita damaĝo dum milito. Sed hodiaŭ kunvenas la elito de la flandra esperantistaro.

Cu ne rajte nia nuna kongreso estas ankaŭ distra? Cu ne rajte ni festas nian delonge sopiratan revidon? Cetere, baldaŭ ni reokazigos niajn tradiciajn ligkunvenojn, ĉar la laboro kiu nin atendas ne estas malmulta!

Li parolis nome de F.E.I. okaze de tiu ĉi jarkunveno de Fl. L. E. speciale por klarigi la nunan situacion de la flandra Esperanto-movado, kiel ĝi rezultis kaj disvolviĝis sekve al la militcirkonstancoj. Tial necesas ĵeti returnan rigardon al la jaroj pasintaj.

Li memorigis al nia kongreso de 1940 kiu devis okazi en la ĉefurbo. La tagon antaŭ ĝia intencita malfermo komenciĝis la granda tragedio! Fulmrapida invado. Haoso. La estraro serĉis kaj retrovis kontakton. La «Verordnungsblatt» iĝis nia leĝaro. Demarŝoj ĉe la «Oberfeldkommandantur». Vanaj klopodoj: malakcepto de nia peto daŭrigi nian poresperantan laboron. La estraro decidis spiti tiun malakcepton. Ĝi sekurigis la havaĵojn, kaj komencis la eldonon de modesta, dumonata sed tamen okpaĝa kaj presita periodaĵo. Post kvin numeroj malkovro de nia aktiveco. Enketo de la «Sicherheitspolizei», traserĉoj ĉe nia presisto, nepra malpermeso al Fl. L. E. ion plu eldoni aŭ iel plu aktivi. Plej nigra periodo de la nigraj militjaroj!

Subita espero: «Paco kaj Justeco» la sekcio de Fl. L. E. kiu organizas nian nunan kongreson, brave transprenis la torĉon kaj aperigis siavice kaŝorganon! Ĝi aperis regule, seninterrompe, kaj tiu «militifano» ankoraŭ nun ekzistas.

Premanta malaktiveco por la estraro! Malobei la nepran malpermeson estus vere tro riska. Sed Flandra Esperanto-Instituto ne ĉeestis sian libro-vendadon kaj korespondan kurson. Baldaŭ ĝi komencis dissendi cirkulerojn pri Esperanto-literaturo kaj eĉ presigis belan 12-paĝan, ilustritan libroprospekton. Nia Instituto transprenis pli kaj pli la taskon de Fl. L. E.

Finfine venis la liberigo! La laborpreta F.E.I. dissendis novan ilustritan prospekton okaze de Zamenhoftago 1944. Samtempe ĝi faris enketon kiu montris ke en Flandrujo restis intereso por nia afero en 57 lokoj. Nia obstino kaj eltenemo trovis sian rekompencan!

Prema papermanko malhelpis ke tuj reaparis Flandra Esperantisto. Sed ankaŭ tiun baron ni sukcesis venki. Ekde majo 1945 ĝi regule aperas en granda formato. Jen kion faris sinsekve Flandra Ligo Esperantista kaj Flandra Esperanto-Instituto. La kongreso decidu ĉu Fl. L. E. denove reprenu sian antaŭan laboron laŭ plena amplekso, malsargante F. E. I. de tasko kiun tiu transprenis kiam tirana mano katenis nian Ligon.

S-ano Cortvriendt finis dirante ke la flandraj esperantistoj ne bezonas lecionojn aŭ ateston pri «bona civitaneco». Nia sinteno pasinta sufiĉe provas ke por ni Esperanto ne estas senenhava vorto, sed rokfirma konvinko kaj alta idealo kiu indas nian fleĝon kaj sirmon eĉ en momentoj plej tragikaj! Se ni daŭre konscias la grandiozecon de nia afero, zorge forigas la dilettantismen el niaj metodoj, nepre forjetas ĉian lokan grupŝovinismen kaj pli

kaj pli kreskigas en nia menso la konscion ke ni apartenas al Flandra Ligo Esperantista, tiu ĉi nedubeble iĝos bela unuo en la koncerto de la landaj Esperanto-asocioj kaj kiel valora tuto ni, pli malpli frue, ekokupos nian postenon en la internacia Esperanto-movado. (Sekvis longaj aplaŭdoj.)

S-ano F. Roose, prez. de la organiza komitato, komunikis la telegramojn kaj salutoleterojn ricevitajn:

- de La Estonto Estas Nia (L.E.E.N.), la neŭtrala nederlanda Esperanta-asocio;
- de Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo (F.L.E.);
- de Tutmonda Junular-Organizo (T.J.O.);
- de Belga Laborista Esperanto-Asocio (Belea);
- de Karolo Solc el Mlada Boleslav (Ĉeĥoslovakio), iama profesia Esperanto-instruisto de Fl. L. E., kiu i.a. invitas al la feraj Esperanto-kursoj en Doksy kaj esprimis sian indignon pri la atenco kontraŭ la flandra Izer-monumento;
- de S-ano A. Lodema, Esperanto-veterano el Antwerpen.

Sinsekve voĉe salutis la kongreson: F-ino T. Hagen (ŝi aviadile venis de Rotterdam por ĉeesti nian kongreson) kiu laŭdis la samideanan spiriton de la flandraj esperantistoj kaj asertis ke nur pasportaj kaj devizaj malfacilaĵoj estas la kaŭzo ke nur kelkaj nederlandaj samideanoj ĉeestas, venontjare la nederlandanoj tutcerte venos kelkdekoje;

S-ano C. Rogister el Namur esprimis sian admiron por la entuziasmo de la flandra esperantistaro kaj envias nian aktivecon. Li montris la plorindan situacion de Esperanto en la suda parto de la lando, en Valonujo. Li esprimis sian kunsenton en la profanigo de la flandra Izer-monumento kaj petas la estraron peri mondonacon por ĝia rekonstruo, same por helpi al aŭstraj kaj germanaj samideanoj.

Poste laŭvice salutis la delegitojn de la sekcioj de Fl. L. E. kaj kelkaj individuaj esperantistoj, i. a.:

- S-ano P. De Cock (Aalst), S-ano F. Volders (Antwerpen), Prof. Fr. Couwenbergh (Blankenberge), Prof. E. Symoens (Brussel), S-ano L. Debruyne (Gent), S-ano Fr. Luyten (Heist-op-den-Berg), S-ano A. Cogne (Kortrijk), S-ano L. Vercaemmen (Mechelen), ing. M. Somerling (Nieuwpoort), S-ano J. Cantaert (Ronse).

Vigljaj aplaŭdoj sekvis ĉiujn esprimatajn salutojn.

La liga prez., D-ro T. van Gindertaelen, dankis al ĉiuj. Li certigis al S-ano C. Rogister, ke Fl. L. E. pretas helpi la valonajn samideanojn kiuj iniciatus la starigon de forta movado en Valonujo. Li proponas ke komisiono pristudu la organizajn problemojn de Fl. L. E.-F. E. I. kaj raportu en la sekvonta ligkunveno (Akceptita).

Nome de la estraro li proponis al la kongreso akcepti sekvantajn dezirospojn:

La XI-a Kongreso de Flandra Ligo Esperantista en sia ĝenerala jarkunveno de la 9-a de junio 1946-a



**MALJUNULO MIGRAS - VENGO.** (Du kamparaj noveloj) de Stellan Engholm. Eldonis: Eldona Societo Esperanto, Stockholm. 48 p., prezo: broŝ. 18 bir. (Elĉerpita).

— Du kamparaj noveloj de sveda verkisto, kiu per siaj romanoj jam valore pliriĉigis nian originalan literaturon. En «Maljunulo Migras» temas pri viro kiu, ĝisoste tedita de la lamentado kaj avareco de l'edzino ŝtele foriras piede al sia filo, loĝante en tre malproksima urbo. Jam tuj post la renkontiĝo li subite konsciigas pri la neadaptiĝo de iliaj naturoj kaj la stulteco de sia forkuro. Hejme, post iom da ripozo enĉambra ĉe la pentanta edzino, li mute ekprocedas denove al la ĉiutagaj taskoj, neprecize sin sentanta unueca kun la ĉirkaŭantaj kutimajoj.

En «Vengo», filo post sesjara foresto revenas hejme ĉe la soleca kaj zorge vivanta patrino, kaj memorante pri «kruela ago» de administranto en sia junaĝo spertita, li vergas ĉi tiun maljunulon, la «monstron de malico» por liaj subuloj. Post serenanima pago de punsumo li rifuzas solidaran mondonacon kaj post trankvila interparolo kun sia kvazaŭsaga vergovikfimo, malgaje ekkonscias pri l'vaneco de sia venĝo kaj la fremdiĝo al sia hejmloko kaj pasinto...

Rakontoj flustilaj, simplesprimaj, ĝueblaj eĉ de mezspertaj samlingvanoj kvazaŭ en gepatra lingvo. Cetere la migranta maljunulo povus esti flandra kamparano! Senpasia, senbrua, iom unutona glitado de l'vortoj agorde kun la kamparana vortretenemo. Psikologia ektuŝo al nekomplikaj naturokajemo al detaloj. Post daŭra, iom melankolia interesiĝo pri l'travivaĵoj, kelkfoje dubaj, ni kontente envicigis la plaĉan libreton en nian kolekton.

TYN.

**HUMORA NOVELARO de Hasse Z. El la sveda tradukis F. Szilagyi.** Eldonis: Eldona Societo Esperanto, Stockholm. 59 p. Mendebila ĉe F. E. I., prezo: broŝ. 24 bir.

— La tradukinto prezentas 13 karakterizajn noveletojn de Hasse Z. (H. H. Zetterström), «unu el la plej eminentaj humoristoj de la sveda literaturo». Per tiuj malfacilaj rakontoj, el kiuj la plimulto ampleksas eĉ ne 4 paĝojn, la aŭtoro igas nin jen kompare, jen superece rideti pri strangaj infanaĵoj, ridindaj situacioj, sed tuj poste li jam ektuŝas pli profundajn kordojn de la homa koro, naskante komprenemon kaj kunsenton antaŭ nekonjektitaj drametoj apenaŭ skizitaj, tamen realaj kvankam kaŝitaj sub kelkfoje komikofika eksterajo.

Klara, flua, simpla stilo, el kiu forestas eksperimentoj, komplikaj formoj kaj esprimmanieroj. Rimarkinda estas lia prefero por la konciza frazo, pro kiu li foje-foje ellasas la pronoman subjekton aŭ la demandan «ĉu». Uzataj en ne-ĝenerale akceptita signifo: «atesti, posteno, paro.» Neklaraj: «surfiŝilo al fenestro, marismo.»

Dubaj: «arĝent-edza datreveno; simili kiel du eroj; la elektra lumo lumas, kiam oni forgesos fermi la kontakton; mi iris unu etaĝon pli suben anstataŭ por iri pli supren.»

Malklaraj pro ellaso: «La doktoro silentigis sian konsciencan (per la penso) ke li ĉiokaze agas bonfare; li metis ilin (unu) apud la alian.»

Gramatika senriproĉa lingvo. Tamen: «mi sidis daŭre sur valizon.» «Se Jakobo estus homo, ĝi tuj estis konstata, ke...»

Kiu ŝatas delikatan humoron kaj mildan satiron, trovos ĉi tie laŭ sia gusto. Fr. C.

1<sup>o</sup> esprimas la deziron ke la neŭtralaj internaciaj Esperanto-asocioj senprokraste kaj en spirito de reciproka toleremo pristudu la reunuiĝon de la neŭtrala internacia Esperanto-movado;

2<sup>o</sup> esprimas la esperon ke tiu de ĉiuj sopirata unueco efektiviĝos plejlaste okaze de la unua postmilita universala kongreso;

3<sup>o</sup> instigas ĉiujn internaciajn Esperanto-asociojn, neŭtralajn aŭ ne-neŭtralajn, pristudi senprokraste la starigon de tutmonda Esperanto-instanco kiu reprezentus ĉiujn esperantistojn senescepte;

4<sup>o</sup> decidis komuniki tiujn dezirospojn al la Esperantogazetaro por ke ili veku ĝeneralan atenton kaj simpatian kaj pritraktas pli la tagordon.

(Unuanime kaj entuziasme akceptita.)

La liga prez. disvolvis bone pripensitajn planojn por la propagando kaj oficiale anoncis ke la Belga Nacia Radio-Instituto (B.N.R.O.), ekde oktobro venonta, disponigos ĉiun sabaton posttagmeze la mikrofonon por Esperanto-elsendoj. Li publike dankis Prof. E. Symoens kiu gvidos Esperanto-kursojn antaŭ la mikrofono (longaj aplaŭdoj).

Li anoncis por la venonta vintro serion da laborkunvenoj de Fl. L. E. ĉar granda tasko nin atendas, taskon kiun ni ĉiuj entuziasme kaj konsciece devas plenumi. La venontjara kongreso de Fl. L. E. arigu almenaŭ trioble tiom da flandraj esperantistoj! Li oficiale fermis tiun unuan postmilitan kaj memorindan jarkunvenon de Fl. L. E.

Survoje al restoracio «Lyber», kie ilin atendis bonega kaj abunda tagmanĝo, la esperantistoj haltis sur la granda placo, sin lokigis sur la ŝtuparo de la provincestrejo por la oficiala fotografaĵo.

Posttagmeze la kongresanoj en motorboatoj ekskursis sur la kanaletoj de la kongresurbo, admirante laŭ nova perspektivo la «Norda Venecio».

Je la 19-a la kongresanoj komencis invadi la salonegon «Cooperative» en kies fundo F.E.I. aranĝis ampleksan librostandon. Sur longaj tabloj centoj da volumoj tiris la atenton. La standon tuj sieĝis la aĉetemuloj kaj la afablaj vendistinoj sub gvido de S-ano Cortvriendt devis multe klopodi por kontentigi ĉiujn akiremajn libro-amantojn.

Je la 20-a komenciĝis la «varia vespero». Ni tuj diru ke ĝi estis la ĉefajo de la tuta kongreso. La prezentitaj deklamoj, kantoj, dancoj, muzikpecoj, filmoj, hipnotismaj demonstracioj kaj la Schwartz-kabareto sufiĉis por pleniĝi almenaŭ tri tre indajn festprogramojn! Raporti detale pri tiu unika vespero necesigus almenaŭ tutan kolonon de F. E. I. Tiun taskon ni humile rezignas, sed nian dankemon kaj admiron ni esprimas al ĉiuj gesamideanoj kiuj kunlaboris al ĝia brila sukceso: Gr. Maertens (regisoro), Et. Debaets, F-ino M. L. Roose, F-ino G. Maertens, F-ino M. L. Senave, F-ino M. T. Roose, A. van der Donk, M. Verschuere, A. Claeys, F-ino G. Mallet, F-ino R. A. Roose, S-ino H. De Kersgieter, F-ino A. Duprez, F-ino H. Hofman, F. Roose. Kaj ni ne forgesu mencii la «steldancistinojn» R. Jurion, nek la «teknikiston» G. Bruyneel kiu per komplikaj aparatoj sorĉe lumigis la scenejon, nek F-ino M. L. Bruyneel kaj H. van Roo-sebeke kiuj gvidis la danctrupon, nek la teknikiston kiu montris la filmojn (i. k. tiu pri la «Procesio de la Sankta Sango» estis la plej vidinda), nek la «flagsvinganto», ktp., ktp.

La noktomezo jam delonge pasis kiam ni entuziasme aplaŭdis la finalon de la alterne amuza, ĉarma, interesa, sprita, kultura, unuvorte vere varia kaj neforgesebla festvespero.

La trian kongrestagon speciala tramo veturigis nin al la marbordo. Ni faris la vojaĝon kantantaj plenpulme laŭ la akompananta mandolinmuziko. De Knokke ni promenigis ĝis Duinbergen, kie ni haltis sur la strando. La akra vento, kiu glutigis al ni porcion da sablo, ne malhelpis ke kelkaj kuraĝuloj — kaj kuraĝulinoj — sin ĵetis en la ŝaumantan ondaron.

Kaj plue iris la karavano, ĝis Heist, kie, en hotelo «Mondial», atendis nin bonvena tagmanĝo kaj malgranda orkestro. Ĉiu sentis proksimiĝi la momento de la adiaĵo sed deziris despli intense ĝui la lastajn horojn de kunesto. Lastan fojon ni kantis nian repertuaron de Esperanto-kantoj akompanitaj per la hotela orkestro, kaj la nelacigeblaj kongresano kaptis la okazon por danci lastan fojon. Kaj post promesoj de revido komenciĝis la fuĝo al la stacidomo, kiu feliĉe troviĝis tute proksime...

La XI-a kongreso de Fl. L. E. ankaŭ estas la XI-a kiun ni partoprenis. Kiom ajn brilaj estis ĝiaj «antaŭuloj», nia XI-a pleniĝis min per malofita ĝojo, ĉar ĝi demonstris ke nia organizaĵo restis la magnetito kiu nerezisteble altiras la junajn, entuziasmajn, ardantajn korojn. Tial mi aŭguras: Flandra Ligo Esperantista, belan estontecon havas vi!

PARTOPRENINTO.

## Postkongresa Komunikilo

La organiza komitato deziras esprimi sian dankon al ĉiuj samideanoj kaj al ĉiuj sekcioj de Flandra Ligo Esperantista kiuj iel ajn helpis sian laboron, ĉu per efektiva kunhelpo, ĉu per frua aliĝo, ĉu per financa subteno, ĉu per prunto de propaganda materialo.

Fotografajoj de la Kongreso estas mendeblaj ĉe la kongresa oficejo J. en M. Sabbestr. 12, Brugge. Ili kostas po 7 bfr. (poŝtkonto 479170 je nomo de kongresa kasistino H. Dekersgieter).

Al ĉiuj partoprenintoj ni diras ĝis revido dum Pentekosto venontjara!

**LISTO DE LA KONGRESANOJ**

1) Emiel Cortvriendt, Brussel; 2) D.ro Theo Van Gindertaelen, Mechelen; 3) Achiel Pittoors, Antwerpen; 4) Mariette Willems, Bredene; 5) Jan Van As, Antwerpen; 6) Gust. Baumers, Turnhout; 7) Albert Cognie, Kortrijk; 8) Rosa Jurion, Brugge; 9) Camille Rogister, Namur; 10) Sino Rogister, Namur; 11) Fernand Roose, Brugge; 12) Henriette De Kersgieter, Brugge; 13) Roger De Schepper, Brugge; 14) Gég. Maertens, Brugge; 15) Gilberte Maertens, Brugge; 16) L. Hendrickx, Brussel; 17) Franc. Cauwenbergh, Blankenberge; 18) Vallee Vaneste, Gent; 19) Frans Luyten, Heist-op-den-Berg; 20) Adolf De Keyzer, Brussel; 21) Lyd. De Keyzer, Brussel; 22) Rose-Anne Roose, Brugge; 23) M. L. Roose, Brugge; 24) M. Th. Roose, Brugge; 25) XXX.

26) Pastro J. De Mayer, Nijvel; 27) Agnès Duprez, Brugge; 28) H. Van Hoo-rebeke, Brugge; 29) Leo Vercammen, Mechelen; 30) Georges D'Haeveloose, Tielt; 31) Carlo Braet, Brugge; 32) Palmyre De Cock, Aalst; 33) S.ro Roosen, Aalst; 34) Sino Buyl, Aalst; 35) Julia Povevijn, Aalst; 36) Maria Van Poucke, Brugge; 37) Thérèse Van Poucke, Brugge; 38) Simonne De Baets, Brugge; 39) Juliette Terrijn, Gent; 40) Elza De Pril, Antwerpen; 41) Paula Hallet, Antwerpen; 42) Louise Janvier, Antwerpen; 43) Constance Dirckx, Antwerpen; 44) Maria Dockx; 45) Gerard De Boes, Antwerpen; 46) Agnes De Schrijver, Brugge; 47) Lucien, Truyen, Antwerpen; 48) Jan Van Thijckom, Hemiksem; 49) Sino V. Thuyckom, Hemiksem; 50) F. Volders, Antwerpen.

51) Sino F. Volders, Antwerpen; 52) Louise Dirckx, Turnhout; 53) Edward Boyens, Antwerpen; 54) S.ro De Keyzer, Ekeren; 55) Sino Volders-Van Troyen, Antwerpen; 56) Ignace Maertens, Mechelen; 57) Albert Marmenout, Blankenberge; 58) Leo Braet, Nieuwpoort; 59) Sino Braet-Vermeire, Nieuwpoort; 60) Marc Braet, Nieuwpoort; 61) Jean Cantart, Ronse; 62) Sino Cantart, Ronse; 63) Roger Iserentant, Brugge; 64) Blanche Schepens, Brugge; 65) André Marchal, Brugge; 66) Edw. Symoens, Brussel; 67) Gérard De Brouwere, Kortrijk; 68) Sino De Brouwere, Kortrijk; 69) Laura De Brouwere, Kortrijk; 70) Karel De Brouwere, Kortrijk; 71) Marc Spiers, Ronse; 73) Raymonda Van Eenoghe, Oostkamp; 74) P. H. Mooij, Brussel; 75) Sino Ernst, Brussel.

76) G. J. J. M. Van Keulen, Rotterdam; 77) M. Stoffels, Rotterdam; 78) Roger Cool, Brugge; 79) Leon De Bruyne, Gent; 80) Charles Van de Putte, Ronse; 81) Sino Van de Putte, Ronse; 82) F.ino C. J. M. Hagen, Rotterdam; 83) Frits Van den Brande, Brussel; 84) Lillia Van Beekhoven, Brussel; 85) Germaine Mallet, Brugge; 86) Marie-Louise Senave, Brugge; 87) Christiane Deuss, Brugge; 88) Cécile Deuss, Brugge; 89) André Dumare, Brugge; 90) Etienne De Baets, Brugge; 91) André Van der Donckt, Brugge; 92) André Denys, Brugge; 93) André Claeys, Brugge; 94) Moyella Van Reckem; 95) Gilbert Bruyneel, Brugge; 96) Fernand Vernimme, Brugge; 97) Georgette Roosen, Aalst; 98) S.ro Calis, Antwerpen; 99) Sino Calis, Antwerpen; 100) M. L. Bruyneel, Brugge.

101) Yvonne Maertens, Belzele; 102) Huguette Hofman, Brugge; 103) D. Hamerlinck, Brugge, Maria Lantsoght; 104) Sino De Vlieghe, Brugge; 105) S.ro Van de Velde, Gent; 106) S.ro Van de Velde, Gent; 107) Sino Van de Velde, Gent; 108) Marie-Thérèse Roels, Brugge; 109) Jozef Roels, Brugge; 110) S.ro Sommerling, Nieuwpoort.

**NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ kun premioj**

ATENTU: La regularon bonvolu legi en la januara numero.

PREMIO: F-ino M-T. Roose el Brugge gajnis la aprilan premion: « Vagabondo kaj Sinjorino », romano de Walther Kloeppfer.

**SOLVO DE LA 13-a ENIGMO**

HORIZONTALE. — 1. terpom; pel; 2. arc; ofic; ĉe. — 3. sak; eduk; per. — 4. lim; hard. — 5. lul; talp. — 6. matur; kulp. 7. it; dezert; ja. — 8. nul; korn; er. — 9. an; kornist. — 10. virg; rad. — 11. bird; Cili. — 12. hurl; mobiliz.

VERTIKALE. — 1. task; minac. — 2. era; latun; bu. — 3. rekrut; vir. — 4. lud; kirl. — 5. el; rekord. — 6. modif; zorg. — 7. fum; kern; do. — 8. pik; turnir. — 9. ec; halt; ĉi. — 10. palp; tril. — 11. ĉerp; je; ali. — 12. verd; paradiz.

**14-a ENIGMO: ALDONU LITERON**

Reordigu la literojn de la ĉi-subaj vortoj, kaj aldonu novan literon, tiel ke formigu novaj vortoj laŭ la apudaj signifoj. Ekz.: KONTO fariĝu: birdo. Aldonante U oni trovas: NOKTUO.

La aldonitaj literoj, legataj de supre malsupren formas proverbon el la Zamenhofa Proverbaro.

Jen la aliĝendaj vortoj. 1. LAKEO: fariĝu: speco de preĝejo; 2. ABATO: penado por superi kontraŭulon; 3. STELO: akvujo; 4. KARNO: spirorgano; 5. KEPO: jararo prezentanta gravan momenton en la historio; 6. ATOMO: jarparto; 7. KANTO: li-ilo por malhelpi al malliberulo forkuri; 8. KIALO: molusko; 9. SANO: korta birdo; 10. GUANO: mola plumaro; 11. MINO: fantazia estaĵo; 12. TUBO: besto; 13. KONTO: birdo; 14. SARKI: delikate tuŝeti; 15. OKULO:

**ANONCETOJ**

Ĉiu vorto aŭ mallongigo: 0,75 bfr. Enpresigo kostas minimume 15 bfr. Unu int. respondkuponon valoras 3,50 bfr.

KUN GARDENISTOJ kaj similaj profesianoj deziras korespondi Lad. Kynčl, florkulturisto, Praha VIII, Palmovka, Ĉeĥoslovakio.

GEORGI D. SESTRIMSKI, Str. « Silistra » 4, Pazardjik, Bulgarujo, deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

RADIOTEKNIKISTO deziras korespondi kun aliandaj fakuloj pri radio-konstruado. Eventuale pretas akcepti okupon en alianda radio-entrepreno. Sano Nikolao Al-fimirski, Ruse 66, Aleksandrovska, Bulgarujo.

HERALDIKO. Mi dez. interŝanĝi desegnojn pri blazonoj landaj, regionaj, urbaj. S-ano J. Courvoisier, 3, rue St.-Joseph, Chalons-sur-Marne, Francujo.

DEZ. KOR. kun gesamideanoj ĉiulandaj: F.ino Rosa Jurion, Elisabethlaan 13, Brugge (Belg.).

**HOTEL MONDIAL**  
15 Graaf d'Ursellaan 15  
**HEIST-AAN-ZEE**  
Nette kamers — Verzorgde keuken  
Fijne dranken

birdo; 16. ETIKO: vasta vira vesto; 17. TALPO: kreskaĵo; 18. DALIO: la plej alta perfekteco; 19. KORBO: organo servanta ĉe la spirado; 20. KONATO: floro; 21. ARENO: insekto; 22. FARBO: frukto. La solvojn skribu sur apartan folion kaj sendu antaŭ la 10-a de julio al la redakcio!

**ĈAPITRO 13-a**

« Striknino... », Kant malrapide ripetis la vorton.

« Sciŭ », la maljuna profesoro diris plu, « ĉiu veneno havas siajn proprajn. Kiam oni konsumas sufiĉan dozon da striknino, la fenomenoj rapide disvolviĝas. Tre rapide... »

La profesoro mire rigardis al Kant, ĉar li atendis tujan interrompon, kiu ne venis. Surprizita kaj samtempe ĝoja pri ĉi tiu fakto, li hezite diris plu:

« La venenito unue vertiĝas, poste la muskoloj rigidiĝas kaj rapide ekas la trismo — trismo estas krampoj, sinjoro Kant. Teruraj skuoj tuj sekvas, la spirado iĝas neregula, intermita, iam kelkaj krioj ankoraŭ sekvas. Tiam rapide venas la fino. La menso ĝenerale restas lucida ĝis la lasta momento. »

Kant subite havis ideon.

« Profesoro De Groot, ĉu vi scias ĉu la ĉi-tiea apoteko ankaŭ estas provizita per striknino? »

« Jes, certe. » Profesoro De Groot hezitis eĉ ne momenton. Li estis sur konata tereno.

« Ĉu vi kuniras? » Kant afable sed insistente invitis, « mi volas foje rigardi tiun aĵon. »

En la flegejo la du kadavroj tute flankis unu la alian. Sur ĉiun oni sternis tolaĵon.

Profesoro De Groot tuj direktis sin al la apoteka ŝranko kaj transdonis etan brunan botelon al Kant. Sub mortokapo estis legebla: « Strukhnos-Striknino ».

« Strukhnos estas la greka nomo, Inspektoro », volonte klarigis Profesoro De Groot. « La pudron, kiun vi vidas, oni ekstraktas el la strikno, de kiu ekzistas ĉirkaŭ sesdek specoj. Ĝi estas multe uzata kiel medikamento, kompreneble tre etdoze, — po duona — ĝis maksimume du miligramoj en unu tago. Tiel konsumita, ĝi influas la muskolojn, la korobaton, eĉ la generajn organojn. Jes, ĝi estas tre bona kuracilo kontraŭ lamo, kontraŭ nefunkciantaj digestorganoj, por... Ĉu vi povas sekvi, Sinjoro Kant? »

« Vi do certas, Profesoro? »

« Sed, Inspektoro Kant, sed... » La profesoro komence ne trovis vortojn. Kiel iu povis dubi pri liaj klarigoj?

« Jen », li eligis plu, « en ĉi tiuj ses provtubetojn mi enigis la enhavon de la stomako de Dubois. Vi disponu pri unu. Analizigu ĝin en Marseille kaj vi konstatos ke la maljuna Profesoro De Groot ne senpripense konkludas. Dubois glutis minimume duongramon, eble pli, vi vidas, jes... »

Kant fiksigardis la provtubetojn kun ilia naŭza enhavo kaj, neniel streĉante sian imagon, povis diveni kiel la kuracisto pagis sian tempon. Tamen li trovis la ideon oportuna kaj proprigis la tubeton al si.

Doktoro De Groot kviete sidigis ĉe tableto, metis sian ĉapelon sur unu el la kadavroj kaj elpovigis plenskribitan papieron. Li knare metis sian nelegeblan nomon sub la same nedecifreblan tekston.

« Jen mia raporto, Inspektoro. »

Kant dankis, adiaŭis kaj ree subeniris la ŝtuparon. En ties mezo li revante haltis, ege miriganta kelneron kiu devis dufoje peti pardonon antaŭ ol eblis preteriri.

Doktoro Gulopez atendis antaŭ la kajuto de Dubois.

« Venu, Doktoro, ni havas laboron, » li

**JAĤTO VETURAS EL...**

**« KRIMINALA ROMANO »**

rakontis al sia helpanto kion li eksciis en la flegejo.

« Estas evidente », li decidis, « Dubois estis mortigita. »

« Ĉu la veneno estis en...? »

« Guste, en la pulvoraĵoj kiujn li konsumis. Jen la skatoletto. H'm, enestas ankoraŭ kvin. Ni foje ekzamenigos ilin. »

« Ĉu mi portu la pulvoraĵojn al Profesoro De Groot? »

« La pulvoraĵoj? » Kant rifuze manges-tis. « Ne, Doktoro, ne!... Iom atendu! »

Li numeris la pulvoraĵojn de unu ĝis kvin, ŝiris kvin paĝojn el agendo, kiujn li same numeris. Sur ĉiun paĝon li ŝutis trionon de ĉiu kapsulo, post kio li zorge faldfermis ilin.

« Jen, Doktoro. Portu ĉi tion al Doktoro De Groot por esploro. »

Doktoro Gulopez iom hezitis, ne kura-ĝis eldiri kion li pensis:

« Ĉu vi suspekta...? »

« Mi suspekta ĉiujn, sed aparte neniuon ĝis nun, kaj... » Certa antaŭ ĉio », diras la Profesoro.

« Estas preskaŭ la kvara, sinjoro Kant. »

« Vi feliĉe vokas tion en mian memoron. Kiel flugas la tempo! Mi iras rendevui kun fraŭlino Sterlen. » Sed antaŭ ol foriri, li aldonis:

« Nu, antaŭ ol aliri Profesoron De Groot, bonvolu ankoraŭ funde esplori ĉion tie ĉi. Speciale lertaj kaj similaj povas je ti pli da lumo, kvankam la rilatoj Dubois-Maxton ŝajnas klarigitaj. Sed nenion ni povas neglekti. Do, poste kun la specimenoj ĉe la Profesoro kaj tiam vi retrovu min. »

Doktoro Gulopez ŝajnis ravita, ĉar li havis tiom da laboro.

En la kajuto de Kant pendis peza tabakodoro. Li lasis la pordon aperta kaj malfermis la lukojn. Freŝa aero penetris en la ejon. Ĝi bonfaris al li. La mara venteto kaj la verd-blua akvo estis kvazaŭ balzamo por liaj lacaj okuloj. Liaj pensoj ne lasis lin momenton ripozi.

Longan tempon li staris senmova, tute senmova. De tempo al tempo, li nur provis kompletigi sian repertuaron per la perdita melodio.

Tiam subite, batante la plataĵon de la noktoŝranketo, tiel ke ĉio tintis sur ĝi: « Damne!... »

« Ĉu vi tiel bonvenigas min? » muzikis voĉo malantaŭ li kaj, turnante sin, li rekonis Stella Sterlen.

« Pardonu, Fraŭlino Sterlen, mi ekhavis ideon, kaj, ĉar tio estas eksterordinara, mi festis tion en mia maniero. »

« Tiam mi alvenas ĝustatempe por kunfesti! » — sekve, praktike: « Vi venigis min? »

« Invitis », Kant ridetis, « ĉu ne estas pli galante? »

« Ho, invitis. Vi estas ĝentila. »

« Si instalas sin en la prezentitan fotelon kaj elegante krucis la kruojn. »

« Vi scias, Fraŭlino, ke Jean Dubois... »

« Jes, mi aŭdis tion. Estas kruele. Kiel tio eblas? »

« Sinjoro Dubois estis murdita. »

Verkis: Deck Dorval.  
Tradukis: Dro T. Ken.

« Estas ja vere? »

La tembro estis multe pli mallaŭta, sed ne malfirma.

« Vi havas bonajn nervojn, Fraŭlino. »

« Kial? Ĉar mi ne tuj konfuziĝas? Sinjoro Kant, mi bone komprenu unu la alian. Mi ne ŝatas scenojn, sed tio ne signifas ke mi estas sensenta. Mi certigu al vi... ke la morto de Dubois tre tuŝis min. »

« Vi sendube komprenas, Fraŭlino, ke en kazo kia la mia ne plu decas ĉirkaŭi la realon. Mi deziras fari al vi kelkajn demandojn, kiujn mi ŝatus sincere responditaj. »

« Ne ĝenu vin, sinjoro Kant. »

Kant ne povis facile difini ĉu ŝi estas serioza aŭ simple mokadas lin.

« Vi kaj Dubois intime amikiĝis? »

« Pli malpli. Ĉu mi povas fumi? »

« Faru. Vi estas la fianĉino de sinjoro Alex Steinmann? »

La forkirliĝantaj fumnubetoj plene okupis ŝian atenton.

« Estis. Pasinta tempo! » Si ŝajne trovis la demandon iom humora.

« Ekskuzu min. »

« Ne gravas. Vi neniel kulpas. Hierau mi ekŝigis Alex. »

« Ĉu Dubois sciis tion? »

« Nu, kompreneble. Ion tian viro kia Dubois nepre rimarkis. »

« Ĉu vi sciis ke Dubois heredus de sinjoro Maxton? »

« Tio do estis vera? »

« Ĉu li rakontis tion al vi? »

« Jes, refoje hodiaŭ. Li certis pri tio. Sed mi ne volis kredi lin. » Si ridetis. « En sia maniero Jean estis bona knabo, sed la veramo ne estis lia ĉefvirto. »

« Ĉu vi kredas ke li memmortigis sin? »

« Ne! Tia ne estis lia karaktero. Li kompreneble estis murdita. »

« Kial tio estas tiel komprenebla? »

« Nu, ĉar li sciis kiu murdis Maxton. »

« Ĉu ankaŭ tion li diris al vi? »

« Silentemo certe ne karakterizis lin. Tio kostis lian vivon. »

« Ĉu li diris al vi kiu estas la murdanto? »

« Ne! Li nur diris ke li nepre rapide memoru tion. Li furiozis ĉar oni provis suspektigi lin. »

« Kiam vi lastafoje vidis Dubois? »

« Dudek minutojn antaŭ kiam mi aŭdis pri lia morto. Li volis alvesti sin kaj kuraci sian kapdoloron. »

« H'm! Ĉu li ne ŝajnis deprimita? »

« Sentime rezignu vian teorion pri memmortigo. La morto de sinjoro Maxton iel ekscitis lin. Li tiel entuziasme parolis pri la heredoo. Sed tio eble estas nura impresoo. »

« Mi kredas ke nun mi estos maldiskretita... »

« Tia vi neniel fariĝos... »

« Bone... Nu, kio vi taksis sinjoron Jean Dubois? »

El la okulunguloj ŝi ruze spionis sian demandanton.

« Vi tamen estas iom scivola, ĉu ne? »

« Versajne jes. »

« Nu, se tio interesas vin », kaj ŝi ŝultrolevetis. « Dubois estis la nura surŝipe kiu sciis trakti virinon. »

« Ho! Tio ne tre flatas la aliajn sinjorojn! »

« Nur hodiaŭ mi ekkonis vian kapablon, sinjoro Kant. »

La inspektoro nevole ridetis. Pri-demanda Stella Sterlen sendube havis ĉarmon. Sed li deziris resti ĉe sia tasko. Montrante skatoleton, li diris:

« Ĉu vi konas tiujn ĉi medikamentojn? »

« Estas ja la pulvoraĵoj de Dubois kontraŭ kapdoloro. Li sufiĉe ofte suferis ĝin. Ĉiu surŝipe sciis tion, mi opinias. »

Frapeton sur la pordon kaj Doktoro Gulopez aperis.

« Ĉu mi ne ĝenas? »

Stella Sterlen ridetis kaj brutligis novan cigaredon.

« Eniru, eniru, Doktoro. Ju pli nombra la rondo, des pli granda la ĝojo, sed, se ambaŭ kune vi pridemandos min, mi retiriĝos, jes ja! »

Si malĉe rigardis en la direkto de Kant.

« Via amiko, la inspektoro, fakte tre seniluziigas min! Mi imagis detektivon tute alia. Nome, pli sagaca. Tiu ĉi viro scias nenion, vere nenion! Li devas ĉion demandi kaj devas mi trovi respondojn. »

« Si petole ridis. »

« Demandi estas facile », ŝi diris plu, « respondi malfacile. Se mi devus pridemandi sinjoron Kant, li versajne ne tiel rapide trovus respondon. »

Kant akceptis siajn ludon kaj defion.

« Foje provu! »

Stella Sterlen leviĝis kaj singarde gladis faldeton el sia ĵuporo.

« Kiu estis la sinjoro kiu, hieraŭvespere, restis tiom malfrue sur la ferdeko? »

« La du viroj rigardis unu la alian kaj eĉ forgesis respondi ŝian. « Ĝis revido, sinjoroj! », kiam ŝi kvere ridante trotetis for. « Kion ŝi celus? » demandis Doktoro Gulopez. »

« Probable nenion », Kant ofendite grumbliis, kaj, sentante ke lia respondo ne kontentigas, li trovis pli konsilinda ŝanĝi la temon.

« Kion diris nia Profesoro? »

« Li demandis kial vi ne transdonis la pulvoraĵojn mem, sed li tuj pretis ekzameni la specimenojn. Fininte tion, li senprokraste aliris vin. »

« H'm! Kaj ĉu vi malkovris ion gravan en la kajuto de Dubois? »

« Jes kaj ne. Amason da leteroj kaj alie diversajn paperojn. »

« Kie ili estas? »

« En la kajuto de Dubois. »

« Ĉu vi ne preferas transloki ilin tien ĉi? Tiamaniere vi povos tralegi ilin, dum mi glutos novan sciencan disvolvon. »

Doktoro Gulopez trovis la ideon bona kaj ambaŭ direktis sin al la budo de Dubois. Enirante, Doktoro Gulopez surprizate haltis.

« Nu, kio okazas, Doktoro? »

« La paperoj... », la vortoj hezite eligis, « la paperoj... Ili estas for... » Li drame montris la nudan tabloplataĵon: « Tie ili kuŝis! » (Daŭrigota.)

Verantw. uitgever F.E.I. — Bestuurder: E. Cortvriendt, P. van Humbekstraat 3, Brussel. — Drukkerij A. Hessens, Komedian-tenstraat 12, Brussel.